## La Espero

L.L. Zamenhof

En la mondon venis nova sento, tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta ĝi la homan tiras familion:
al la mond' eterne militanta ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj inter la popoloj dividitaj;
sed dissaltos la obstinaj baroj, per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos.

## La Tagiĝo

Antoni Grabowski

Agordu la brustojn, ho nia fratar',    Por nova, pli vigla jam kanto!
Ĝi sonu potence de montoj al mar',    Anoncu al ĉiu dormanto:
– Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',    La ombroj de nokto forkuras el mond'!
– Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',    La ombroj de nokto forkuras el mond'!

Post longa migrado sur dorna la voj'    Minacis nin ondoj de l' maro;
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'    Al verda haven' de l' homaro.
– Post longa batalo, maldolĉa turment',    La stela standardo jam flirtas en vent'.
– Post longa batalo, maldolĉa turment',    La stela standardo jam flirtas en vent'.

En ĉiu mondparto, en ĉiu terzon'    En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras por nia saluto reson',    Do kantas de l' tero ni filoj:
– Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',    La ombroj de nokto forkuras el mond'!
– Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',    La ombroj de nokto forkuras el mond'!